# *Kubo rifuzas kalumnian kampanjon usonan por pravigi la ekonomian sie?on*




Havano, 17 okt (RHK) La kuba ministerio pri eksteraj rilatoj denuncis la eskaladon de Usono en sia agresema politiko kontra? Kubo jah atentigis ke tiu registaro utiligas diversajn pretekstojn por pravigi sian genocidan blokadon kontra? la kariba insulo.

Carlos Fernández de Cossío, ?enerala direktoro por Usono de la koncerna ministerio kuba, klarigis ke specife Usono celas defendi per kiu ajn rimedo sian unuflankan politikon, kiu estas konstante rifuzata de la internacia  komunumo pro ties krima karaktero kaj perforto de la Internacia Juro.

Li deklaris ke Usono fabrikas senfundamentajn kalumniojn kontra? Kubo per la nomataj incidentoj de sano, kaj aliflanke, ke ili celas restarigi la fiaskitan kampanjon kontra? Kubo en la temo de homaj rajtoj.

Anstata? dialogi surbaze de respekto, kion Kubo ?iam pretas fari por kunlabori kiel estas la praktiko  kun aliaj landoj, la registaro de Usono inventas falsa?ojn .

Kubo estas paca lando, kiu evoluigas siajn eksterajn rilatojn surbaze de respekto kaj kunlaboro, kaj tial la usona politiko restas izolita, kio evidenti?os denove la venontan 31-an de oktobro  kiam la internacia komunumo pledos denove por haltigi la usonan sie?on, kion ili devus atenti ?ar estas tutmonda postulo.

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/174137-kubo-rifuzas-kalumnian-kampanjon-usonan-por-pravigi-la-ekonomian-siegon

Radio Habana Cuba